Instru-Cirkulero 1
15.02.2005

Karaj Gekolegoj,

gxojigis min viaj reagoj, el la ricevitaj leteroj elradias vera subtenemo, dedicxiteco al E-instruado kaj la bonvolo helpi min, aliajn gekolegojn per ideoj, instrumaterialoj, konsiloj. Koran dankon!
Via kunlaboremo refortigas min, ke kunordigo, plibonigo de E-instruado estas komuna intereso kaj indas labori por gxi.
Pardonu, ke pro tempomanko mi ne povis aparte respondi al vi cxiuj, nun en tiu Cirkulero mi provas verki resumon de viaj reagoj kaj aldonas aliajn gravajn sciindajxojn:

-MENTOROJ: mi ricevis pli ol 20 valorajn reagojn, tio signifas, ke en preskaux cxiu federacia lando ni nun havas min. 1-2 fervorajn kontaktpersonojn/mentorojn. (Mankas ankoraux reagoj el Saarland kaj Schleswig-Holstein.)
(Kelkaj alskribitoj eble tamen ne ricevis mian retleteron en januaro aux ankoraux ne havis tempon respondi, mi tamen sendas tiun cxi leteron, kaj atendas kontaktigxon.)

-INSTRUISTOJ: kolektigxas sciigoj pri aktivaj kaj momente ne aktivaj E-instruistoj. Mi dauxre petas vian helpon trovi ilin kaj informi min. Antauxdankon!

-KURSOJ: venis detaloj pri regule aux momente funkciantaj E-kluboj, kursoj. Mi sxatus atentigi pri la graveco de boninformiteco, kaj petas cxiujn enigi kursinformojn al la retpagxaro www.esperantoland.de

-EKSKURSOJ(!): spertintersxangxcele mi sxatus instigi vin por informi, mallonge raporti ankaux pri jam okazintaj diverslongaj, diversformaj E- kursoj, prezentadoj. Viaj spertoj, rakontoj, analizoj povas esti utilaj al multaj!

-HELPOPETO 1: Ingrid Forkel (Krefeld, ingrid.forkel@web.de) sercxas tauxgajn E-informilojn, specialajn varbilojn/materialojn por infanoj. Se vi havas ion, bv. kontakti sxin.
-HELPOPETO 2: GEA ricevis peton por kunlaboro rilate al la euxropa konstitucio. Pretigxis esperantlingva Traktato pri estigo de Euxropa Konstitucio, kiun lauxplane ricevos kaj la membroj de la Euxropa Parlamento kaj la membroj de la naciaj Parlamentoj, do estas bezono ankaux de la germanlingva traduko. La celo estas pruvi al la parlamentanoj la uzeblecon de pontolingvo Esperanto. Tradukontoj, kunlaborantoj bv. anonci sin!

ICH-NOVAJXOJ: Germana Espreranto-Centro, klerigejo de GEA plilargxigis siajn ejojn, plibonigis siajn servojn en ICH (Interkultura Centro Herzberg), kaj ofertas en 2005 tutjaran programon. Por vidi la ofertojn kaj por pluaj informoj, ktp. bv. viziti la novan hejmpagxon: www.ic-herzberg.de aux www.esperanto-zentrum.de:
-lingvokursoj cxiugradaj (lauxdate ordigitaj en menupunkto: GEA-Centro/Lingvokursoj),
-kursoj, konsultigxo pro ret/memlernantoj,
-fakaj kursoj, fakprelegoj (lauxteme, menupunkto Specialaj kursoj),
-studadsesioj, klerigado de estontaj E-instruantoj, instruistoj (menupunkto Instruista trejnado)
-ekzameno de GEI: 16 majo 2005
-multaj aliaj kulturaj, turismaj, ktp. ofertoj (menupunkto Programkalendaro)
-kunvenejo, konsultigxejo gxis cx.20 personoj (menupunkto Loko/servoj)
-E-biblioteko, muzeo, arkivo

Bonvenon en ICH! Nia devizo: Venu, vidu, spertu!

PEDAGOGIAJ TAGOJ: 1-3 oktobro, 2005 (alventago povas esti vendredo, 30a septembro, forveturtago lundo, 30 oktobro, nacia festo en Germanio, aux poste, se vi ankoraux sxatus restadi en la Harz-regiono). Pliaj detaloj kaj informoj pri logxado kaj kostoj baldaux venos. Gxis nun pli ol 10 personoj signalis sian intencon partopreni kaj multaj el ili proponis ankaux prelegojn. Dankegon! Mi aparte respondos al la prelegontoj kaj priparolos detalojn de la kontribuoj.

TEMOJ: gxis nun alvenis la sekvaj proponoj por prelego kaj pridiskuto (mi citas klopodante grupigi ilin):

(Grupo 1: oficialigo de E-instruado, E-o en institucioj)
-evoluigo kaj disvastigo de oficiala Esperanto-instruado en lernejoj
-kiel oni povus atingi oficiale agnoskitan edukadon de E-instruistoj en Germanio sur tutsxtata resp. federacilanda nivelo.
-spertoj pri intensaj kursoj cxe popola altlernejo (VHS), en gimnazio aux en aliaj kadroj.
-estas tre grave pli forte informi pri Esperanto cxe universitatoj kaj lernejoj.
-bonvena ankaux estus, se spertaj Esperantistoj ekz. per prelego informas pri Esperanto dum specialaj seminarioj kaj renkontoj de instruistoj. Necese ankaux estus informi la respondeculojn pri la profito por la infanoj.
-estonta organizo de la instruista laboro en lernejoj kaj universitatoj en Germanujo. La Germana organizo estu samtempe la landa ILEI-sekcio.
-evoluo de lernplano (curriculum) por la diversaj sxtupoj de klerigado kiel Esperanto-parolanto/specialisto/instruisto lauxeble paralele al analogaj universitataj kursoj/studoj.
-adaptado kaj simpligo de ekzamenoj nun ofertataj de diversaj instancoj (IEI, GEI)

(Grupo 2: instrumetodoj, didaktiko)
-kiel oni povus kombini la simplan, lauxeble agrablan instruadon kun suficxe pretendema, ankaux lingvike kontentiga lingvokono?
-ludoj kaj aliaj paroligaj ekzercoj en kursoj por komencantoj kaj progresintoj
-spertoj kaj ideoj por klubvesperoj
-apud la lingva instruado: kiel krei bonan grupan etoson?
-kreo, uzo de ne nur lingvaj ludoj
-uzo, kreo de rolludoj
-uzo, kreo de radiodramo
-grupdinamikaj metodoj
-uzo de psikoterapiaj metodoj por malsxargxigi gelernantojn
-Cseh-metodo

(Grupo 3: la instruisto)
-kiujn ecojn havu bona kursgvidanto?
-cxu pagi la instruanton?
-kiel prijugxi la laboron de la instruisto?
-kiuj spertaj kursgvidantoj ekzistas, cxefe en mia regiono?

(Grupo 4: instrumaterialoj, helpiloj)
-kiuj lernmaterialoj ekzistas, tauxgas (estas elprovitaj)?

-komparado de rekomendindaj Esperanto-lerniloj por germane tiel nomata AG (fakultativa laborgrupo) en germanaj gimnazioj
-bezono je komputila instrumaterialo ellaborita por instruhoroj
-kio eniru la "metodikan kofron" de instruanto?
-kiel iam starti novan kurson, "sen denove inventi la biciklon"?
-estus tre bone, se cxiuj partoprenontoj kunprenus siajn plej tauxgajn instru- kaj lernomaterialojn (en papera, komputila aux ajna formo), kiujn oni surloke povos trastudi kaj ecx kopii.

(Grupo 5: E-instruado kaj movado)
-kiel teni la lernintojn cxe Esperanto?
-kial nia movado “perdas” tiom da komencantoj, do homojn, kiuj iam eklernis Esperanton, sed pro iuj kauxzoj ne dauxrigas tion.
-motivigi pli da komencantoj je dauxrigo de la lernado aux ecx aligxo al la movado.

(Grupo 6: varbado)
-varbado por Esperanto
-metodoj de varbado kaj de alloga instruado.
-informado de la gazetaro: Eo-organizajxoj (aux Eo-instruistoj) ofte malbone informas la gazetaron pri kursoj, prelegoj ktp.

(Grupo 7: ceteraj temoj)
-kromaj temoj, kiuj ne rilatas nur E-instruadon, sed tauxgas por jam "pli spertaj grupoj": vojoj el konflikto
-interkultura lernado
-verki kaj prezenti rakontojn
-la lernado de la angla faciligita per la samtempa lernado de Esperanto
-memlernado
-komparo de diversaj gramatikoj

Novaj proponoj, ideoj, deziroj estas ankoraux akceptataj.

Pardonu tiun longan cirkuleron, sed mi pensas, ke cxiuj punktoj estas gravaj.
Mi klopodos regule sendi al vi informojn pri E-instruado kaj petas vin fari la samon.

Kun multaj salutoj:
Zsofia Korody

Mi sxatus, se gravaj novajxoj, informoj pri E-instruado kaj rilataj temoj atingu cxiujn interesigxantojn. Al nia retpagxaro ni aldonis butonon por aligxi al la Korespondlisto. Informu viajn konatulojn pri tiu ebleco: oni simple vizitu www.esperanto-zentrum.de, menupunkto Kontaktoj,Aligxoj, kaj alklaku: Korespondlisto. Tiel nia Cirkulero kaj aliaj estontaj sciindajxoj rekte atingos la aligxintojn.